



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA – DISTRITO FEDERAL

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

ANO IV

SETEMBRO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

Nº 38

Redação: MARIA ALMADA

GRAVAS LA HOMO

La Esperanto-Movado en Brazilo vigligas notinde. Ni kuraĝas aserti, ke Brazilo donas bonan akzemplon al la tuta Latinameriko. Sendube post la okazinta 1-a Latinamerika Kongreso de Esperanto, en Marilja, la ceteraj sudamerikaj landoj, same aklaboras. La latinamerikanojn videble entuziasmigis la okazonta U.K. por 1981-a en Brazilio.

Nia Konsilantaro jam zorgas pri la fervorigo de la aliaj landoj. Nia vicprezidanto Eleus L. de Sá, el Bahía, skribis al sia amiko en Paragvajo: "Ĉiuj sudamerikaj landoj ĉeestis la Latinameran Kongreson, nur via lando mankis... Mi esperas, ke ankaŭ Paragvajo aperos en la venonta Kongreso". — Tio signifas, ke la Konsilantaro ne perdas tempon, sed klopodas entuziasmigi la alilandanojn, kiuj ankaŭ ne aktivas.

La redakcio de nia Bulteno ricevas multajn kuraĝigajn leterojn, de nia estimata anaro, sed ni ricevus riproĉojn de kelkaj elementoj, dirante, ke ni multe skribas pri personoj kaj pri ilia laboro. Ili opinias, ke ni devas pritrakti aliajn temojn, ĉar kiel ĝi estas nia Bulteno ne estas prezentebla eksterlande.

Mi demandas: "Ĉu la kritikantoj jam legis la laŭdantajn leterojn, kiujn ni ricevus, rilatajn al nia Bulteno? Do, ke oni ne timu. Ĉu alilandanaj esperantistoj ne havas malfacilaĵojn kiel ni?

Iu diris, ke estus interese organizi

bonan gazeto-servon kaj ke ĉio okazu ĉirkaŭ tiu gazeto. Mi iom stulte gapaĉis je la parolinto, ĉar nia anaro konsistas el homoj kaj mi imagas, ke la gazeto servas al la homoj kaj ne male.

Dum tiu naŭdek kaj kelkaj jaroj, ek de la apero de Esperanto, oni nomis la anaron "frenezuloj" kaj por ke la epiteto iĝu pli alloga oni aldonis la adjektivon "verda". Sekve ni iĝis "verdaj frenezuloj", "verdaj Don Kihotoj", "verdaj stelo-adorantoj" kaj nur mankas, ke oni nomu nin "gazeto-adorantoj".

Nia anaro estas sana, bona kaj kuraĝa! Ĉiu unuopulo klopodas ia ajn maniere servi la movadon. Multaj el ni dediĉas siajn ripoztagojn, monon, laboron kaj pacon al Esperanto. Ofte oni alfrontas malagrablajn rimarkojn, eĉ mokon de kelkiuj, sed la vera esperantisto ne laciĝas, pardonas la erarojn de kelkaj homoj kaj daŭre "sekvas la vojon celitan".

La enhavo de nia Bulteno estas verkata simple, por ke ĉiuj ĝin komprenu. Ĝia celo estas informi la legantaron pri la okazintaĵoj en nia vastega lando. Pere de ĝi ni sukcesis eltrovi elementojn, kiuj dum jardekoj silentis kaj ni sukcesis aktivigi ilin. Ili nun denove instruas la internacian lingvon, partoprenis la Latinameran Kongreson de Esperanto kaj nun daŭre agas en siaj urboj, dank' al la stimulo de nia Bulteno.

La plimulto de niaj legantoj estas kontenta kun nia laboro kaj Bulteno. Ni enketis kelkajn eminentajn esperantistojn,

petinte opinion kaj sugeston. Ĝis nun ĉiuj estis unuanime favoraj al daŭrigo de nia laboro, opinante bona la Bultenon.

Ni elstarigas la aktivecojn de nia anaro, kio feliĉigas nin, ĉar tiel ni sukcesis eltrovi altalarajn personojn en nia movado. Ni laŭdas ĉies klopodojn, ĉar ili ĉion meritas. Por ni ĉiuj estas elstarigindaj. Ni skribas pri personoj ĉar al ni gravas la homoj!

☆☆☆☆☆

SPIRITA ELDONA SOCIETO "F. V. LORENZ"

La Spirita Societo "F. V. Lorenz" sciigas nin, ke jam mendis la unuan libron eldonotan en la unua jaro kaj tuj mendos du aliajn. Ili estos pretaj antaŭ la jarfino. La Societo estis fondita por disvantiĝi la librojn pri spiritsmaj temoj. Sed por atingi tiun celon ĝi bezonas helpon de la esperantistaro. Estas necese varbi novajn anojn al la Societo, kaj havigi donacon al la Fonduso Porto Carrero Neto kaj Fonduso Iŝmael Gomes Braga.

La Societon gvidas nia vicprezidanto Delio Pereira de Souza, emerita alta funkciulo de Banko de Brazilo. Adreso: - Caixa Postal Nº 3.133 - CEP 20.000 - Rio de Janeiro (RJ) - Brazilo.

☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS...

D-ro Adonis Marcelo S. Silva, nia vicprezidanto, informas al gesamideanoj, kiuj pretis kunlabori kun li sur kampo de Brazilo-Skolta movado, ke pro teknikaj malfacilaĵoj, li ne povis ĝis nun kontaktiĝi kun ili. Lia adreso estas: Caixa Postal Nº 192 - CEP 35.180 - Acesita (MG).

☆☆☆☆☆

ESPERANTO ELEMENTAR

La lernolibro de Prof-ro F. S. Almeida estas vendata de San-Paŭlo Esperanto-Asocio (Caixa Postal 5.888 - CEP 1.000 San Paŭlo (SP); Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Caixa Postal 1.887 - ZC - CEP. 20.000 - Rio de Janeiro (RJ); kaj

ĉe la aŭtoro mem, adr.: Rua Galeão Carvalho, 31-73 - CEP 11.100 - Santos (SP). En Brazilo ĝi estas vendata de la Libro-Servo de Brasília Esperanto-Asocio (Caixa Postal Nº 04.0406 - CEP 70.000 Brasília (DF).

☆☆☆☆☆

DRO MANUEL BELMONTE DE ABREU

Juristo, ĵurnalisto, poeto kaj vicprezidanto de nia kara BKE. Li naskiĝis en grava ŝtato de Brazilo-Rio Grande do Sul.

Esperanton li lernis, ĉar leginte spiritisman gazeton pri la idealo de Zamenhof, li konstatis, ke la internacia lingvo estas tre interesa kaj grandvalora por la homaro. Fratigi kaj pacigi la popolojn estas ankaŭ la idealo de sam-nomo Belmonte de Abreu, pro tio li fariĝis fervora esperantisto.

Ofte li verkas artikolojn pri Esperanto por gravaj gazetoj de Porto Alegre kaj aliaj urboj de Rio Grande do Sul, inter kiuj estas "Correio do Povo", "Diário de Notícias", kies kunlaboranto li estas. Krom tio, li bone propagandas pri sia movado en la gazeto "Esperanto-Aldono," de Bagé.

Li Estas membro de UEA, KKE kaj BEL. Lia afabla helpo kaj kunlaborado estas grava por nia movado.

D-ro Belmonte ne mankas al esperantaj seminarioj, kunsidoj, kaj ĉeestas akurate en ĉiuj lokoj, kiuj altiras lian atenton kaj kiujn li riĉigas kaj valorigas per sia kunlaboro. Kune kun sia ĉarma edzino li klopodas helpi ĉiamaniere por ke nia movado kresku kaj iĝu valora al homaro.

Li afable donacis al nia prezidanto la duan volumon de "Anuário de Poetas do Brasil", kompilitan kaj publikigitan de Aparicio Fernandes, kie troviĝas poemoj, kiujn li verkis. Inter la belegaj versaĵoj de nia samideano ni elektis la jenajn:

NOVA MESSE

O esquerdo da balança pesa
sobre o mundo
— que o direito já era!...

Por algum tempinho
quer a Sábia Lei Suprema
siga ele esse caminho,
nova brotação virá depois
da calcinação geral.

Novos fantoches
 entrarão na vida
 reequilibrando os braços.
 Do total arrasamento
 em flores mais belas
 os frutos mais sadios
 o verde saltará.
 — Verde da esperança!
 — Verde do Esperanto!
 Messe triunfante
 do adubo sangue...

AINDA AGORA

— E a cólera do Senhor
 cairá sobre tua cabeça
 irremissível pecador!...
 E os demônios do inferno
 te manterão em fogo eterno
 miserável pecador!...
 — Deus me não faz medo
 Senhor Abade
 o que me faz medo
 é a humanidade...

Kiel ni vidas la poemoj estas en la portugala lingvo, sed li inter la sesdek ok poetoj, kiuj aperas en tiu tibro, estis la sola kiu pritraktis Esperanton. — Ni finas ĉi tiun etan biografion de nia samideano gratulante lin pro la belaj poemoj supre aperintaj kaj pro lia efika laboro.

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. — Argentino

La perditan ringon mi retrovis. Oni rekomencas, reformas, relegas ion. Samsignifa memstara vortero: "ree". "Denove": "Forvojaĝi ree (denove)". "Mi ree kopiis la manuskripton". "La pendolo iradis tien kaj reen." Tiu spirito jam atingis difinitan gradon da alteco. "Ĉar la kontrolo frazo, kiom da alteco li atingis?" — Ĉi tie ne taŭgas, oni devas uzi la prepozicon "de", kaj diri: "gradon de alteco". "Vivis iam tre malriĉa viro, kiu nur posedis unu kaprine-ton". — La vorto "nur" estas en malĝusta loko. La frazo intencas diri ne tion, ke la malriĉulo "nur posedis la kaprine-ton (sed ekzemple ne uzis, ne "melkis ĝin) sed ke li posedis "nur unu aŭ "nur unu kaprine-ton." La regulo: la vorto "nur" devas stari ĉiam senpere antaŭ tiu vorto, kiun ĝi koncernas kaj limigas. — La lakton oni unue senkremigas en la centrifuga maŝino. Estas centrifuga forto. "El la lakta kremo oni per tratabado eltiras buteron." Bone

estas diri: "vivi kiel kuko en butero" (sate kaj glate). "Ĉio iris kiel sur butero (glate). "Buterigi, ŝanĝi en buteron". Oni atentu ne konfuze la vorton "kazo" kin "okazo". — La vorto "kazo" signifas, ĉiu el la diversaj formoj, kiun en kelkaj lingvoj alprenas substantivo, pronomo aŭ adjektivo, laŭ ĝia gramatika rolo: en Esperanto kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo. Esperanto havas dukazan, kaj latino seskazan deklinacion. Kazo — difinita aparta okazo: ekz., "en tiu kazo mi prenas pluviombrelon", "la leĝo ne antaŭvidis tiun kazon. La kazo de Maŭritius". La vorto "okazi" — Estigi, fariĝi en iu loko aŭ momento: "La edziĝo okazis antaŭ tri tagoj; se okazos, ke li mortos; povus okazi, ke iu rekonus mian skribon. 1) Tio kio okazas: stranga okazo trafis min. 2) kazo: "en tiaj okazoj ni uzas la finaĵon "n"; en la plej bona okazo ni povos alveni nur post noktomezo". 3) Feliĉa, favora cirkonstanco: uzi kapti, profiti la okazon; "okazon kaptu ĉe l'kapo ĉar la vosto estas glita". 4) Cirkonstanco, kiu instigas fari on: "Okazo kreas ŝteliston"; "lia morto estis la okazo de la revolucio". Okaza — Hazarda renkontata aŭ okazanta: "tio dependas de pure hazardaj cirkonstancoj. — Hazarda "okaze mi iris sur la strato; la naturaj lingvoj konstruiĝis hazarde kaj senkonscie". Okazebla — eventuala; okazigi: "la societo okazigis kongreson".

NOVAJ VICPREZIDANTOJ

Estis nomumitaj la jenaj vicprezidantoj, kiuj havas la jenajn fakojn: D-ro Paulo Sergio Viana, el Lorena (SP) — por "Scienco"; S-ro Olsen Bento da Cruz, el Curitiba (PR), por "Arto"; S-ro André Luiz Fausto de Souza, el Niteroi (RJ), por "Muzikarto"; S-ro Francisco Matos de Oliveira, el Brasília (DF), por "Lib-rojservo". S-ro Amarílio Carvalho, el Niteroi (RJ) — "Heroldo"; — D-ro Carlos Lima Melo, el Planaltina (GO) — "Medicino". — Laŭ la Artº 8-a, §-1-a de nia statuto, la vicprezidantoj estas kunlaborantoj pri ĝeneralaj informoj por la Bulteno de nia organizaĵo.

MONO RICEVITA

Kiel ĉiuj scias, ĉi tiu Informa Bulteno estas disdonata al pli ol 500 gesamideanoj, kiuj ricevas freŝajn informojn pri nia movado en Brazilo, kaj kun la intenco helpi ĝian publikigadon bonkoruloj afable faras

mondonacojn al ni, kiel ni publikigas kaj ĉiam el tuta koro dankas. Jen novaj donacintoj:

Maria Luiza Bilot	200,00
Cláudio Zimmermann	200,00
Hersila Valverde	100,00
Maria Almada (esperantaĵoj venditaj)	50,00
Nydia Aydos Krieger	500,00
D-ro Ezequias R. Alves	200,00
Evandro A.M.A.Braga	200,00
Sylvio Malheiros(pmarkj)	27,00
M.Belmonte de Abreu	50,00
	1.527,00

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn aperigantajn sciigojn pri la movado kaj dankas la afablecojn: "Rio Grande", "Estado de S.Paulo", "Gazeta de Alagoas", "Jornal de Alagoas", "Vale do Paraíba", "Correio Fraternidade do ABC", "Matutino Popular", "Gazeta de Notícias", "Jacarepaguá City News", "O Líder", "O.NO.SSO", "Diário de Pernambuco", "Gazeta da Bahia", "ZET el Jugoslavio", "Destaque", e "A Nova Era".

FAZENDA ESCOLA "BONA ESPERO"

La ĉefdelegito de UEA por Brazilo, ingeniero Giuseppe Grattapaglia, sendis al ni sciigon pri la agado de la organizaĵo Bona Espero, kaj li intertempe diras: "En via Bulteno, de tempe al tempo aperas la financaj raportoj de BKE kaj de la Socie-

to V.Lorenz, kio estas laŭdinda iniciato por ke ni ĉiuj, batalantoj sur la komuna fronto de Esperanto sciu de kie venas niaj financaj fortoj kaj malfortoj.

Kiu ajn estu nia agado en la kampo o organiza, eldona, eduka aŭ asista, la rimezoj elspesitaj de niaj organizaĵoj estas "investo", kiu povas akceli la oficialigon de la internacia lingvo de ĉiuj niveloj.

Pro tio estas dezirinde, ke ĉiuj niaj organizaĵoj publikigu siajn bilancojn, precipe kiam temas pri la rezulto de kongresoj, seminarioj, renkontiĝoj kaj la plej diversaj aranĝoj. El tiuj publikigoj venos sendube la konsciiĝo, ke niaj financaj rimedoj estas daŭre nesufiĉaj kaj ke pli malavare individua kontribuado estas nepre bonvena".

Nia vicprezidanto Grattapaglia aldonis, ke per helpo de pluraj dekoj da brazilaj kaj eŭropaj esperantistoj oni povis garantii la funkciadon de elementa lernejo konsistigata de 18 geinfanoj (el kiuj 10 estas gastigitaj senpage de la bieno Bona Espero) kaj kunlabori en la mezlernejo de Alto-Paraiso, kie oni instruis al 35 geknaboj.

Kiel ni vidas, Bona Espero kontentige agadas kaj tiel marŝas daŭre la entreprenon. La infanoj bezonas, krom manĝaĵo, vestojn, lernobjektojn kaj la konstruaĵo riparon. Helpu ni al tiu bonfara organizaĵo!!

- Balancete de receita e despesas referentes ao exercício de 1977 -

Spezkonto por la jaro 1977

RECEITA - ENSPEZOJ

- Caixa 19/1/77 - En la kaso de la 1-a/1/77	Cr\$ 930,00
- Verbas federais - Federaciaj subvencioj	Cr\$ 12.000,00
- Verbas estaduais CECON - Stata subvencio CECON	Cr\$ 22.000,00
- Verbas municipais - Komunuma subvencio	Cr\$ 700,00
- Doações - Donacoj	Cr\$ 42.210,00
- de esperantistoj	Cr\$ 6.510,00
- de ne-esperantistoj	Cr\$ 1.000,00
- Banco Francês e Italiano	Cr\$ 85.350,00
Total - Entute	

DESPESAS - ELSPEZOJ

- Gêneros alimentícios diversos - Vivtenado	Cr\$ 28.150,00
- Transporte e manutenção carros e trator - Transporto kaj prizorgado veturiloj	Cr\$ 21.115,00
- Materiais para construção - Konstru - Materialoj	Cr\$ 10.550,00
- Rouparias - Vestoj	Cr\$ 2.350,00
- Adubo e ração - Kemiaj sterko kaj besto-manĝaĵo	Cr\$ 1.550,00
- Mão d'obra - Salajroj diversaj	Cr\$ 6.200,00
- Selos e despesas de escritório - Sekreteriaj elspezoj	Cr\$ 3.760,00
- Diversos (gás, medicamentos) - Diversaj (gaso, medikam.)	Cr\$ 1.950,00
Total - Entute	Cr\$ 75.625,00
Caixa 31/12/77 - En la kaso je 31/12/77	Cr\$ 9.725,00
	Cr\$ 85.350,00

NB—En la spezkonto ne estas konsideritaj la produktoj de Bona Espero (lakto, ovo, legomoj, maizo, fazeolo, kafo kaj fruktoj), en la valoro de Cr\$ 35.000,00 kaj la provizoj ricevitaj de la Stata programo (Merenda Escolar), kies valoro sumas je Cr\$ 11.220,00.

Alto Paraíso de Goiás, 24/3/1978

(Giuseppe Grattapaglia) - Administra Direktoro

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

BALANCETE FINANCEIRO

Ref. JANEIRO/AGOSTO - 1978

RECEBIMENTOS

DISPONIBILIDADES

Caixa e Bancos, em 31-12-77	4.829,11
---------------------------------------	----------

CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS

Recº pela Presidência, de diversos, conforme extrato de c/c de 31-8-78, no período de 1-1 a 31-8-78	11.244,40
---	-----------

Recº em Brasília, pelo Tesoureiro, no referido período, a saber:	
--	--

— João de Oliveira Gama	300,00	
— Álvaro E. Santos Rabello	200,00	
— Maximiliano de Oliveira	50,00	
— Armindo Trarbach	100,00	
— A.A. Antunes Jr.	50,00	11.944,40
	<u>700,00</u>	

BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO

Recº produto da venda de discos recebidos em doação, cfe. cta. PREZ. 4/244, de 03-07-78 . .	50,00
---	-------

<u>16.823,51</u>

PAGAMENTOS

DESPESAS GERAIS

Pago pela Presidência, custo da edição de nn/Boletins nrs. 32 a 37, inclusive etiquetas de endereços	4.260,00
--	----------

Pago pela Presidência, custo porte postal para expedição no Brasil e Exterior, dos Boletins supra	<u>2.077,40</u>	6.337,40
---	-----------------	----------

Pago em Brasília, pelo Sr. Tesoureiro, valor despesas baixo:	
--	--

— Material de expediente (clips, grampo, cola, envelopes, papel etc.) cfe. notas fiscais nrs. 9309, 262016 e 3297	179,00	
— Renovação assinatura — 1978 de n/caixa do correio 07-01182	130,00	
— Telegrama oficial p/Santos	25,10	
— Xerox de documentos	<u>30,00</u>	364,10

DISPONIBILIDADES

Caixa em Brasília — DF	497,29	
Caixa em Santos — SP	6.923,70	7.420,99
Bancos — Bco. Nacional, S.A. — DF	<u>2.701,02</u>	10.122,01
		<u>16.823,51</u>

Brasília (DF), 31 de agosto de 1978.

Carlos A.S. da Cunha — Tesoureiro — CRC — DF Nº360 — CRC — SP 43.051

JUNULARA ANGULO

En la kadro de la 1-a Latinamerika Kongreso de Esperanto kunvenis la Brazilia Esperanta Junulara Organizo (BEJO) por pritrakti la farendajn taskojn. Ili ŝanĝis parte sian statuton, ĉar la sidejon de sta organizaĵo ili translokiĝis al Brazilja (FD).

Spite de multaj malfacilaĵoj, kiujn la BEJO —anoj alfrontas, ili bone aktivas. La junulara organizo helpas la Universala-Kongreso-Komitaton organizi la eventon en 1981.

Dum la Latinamerika Kongreso BEJO elektis la "Miss BEJO", pli bone, reelektis fraŭlinon Heliana Lúcia da Cruz Corrêa, instruistino pri Esperanto en la San-Paŭlo-Esperanto Asocio.

BEJO organizis muzikfestivalon kaj estis aljuĝitaj tri premioj. La premion de Brazilia Konsilantaro de Esperanto gajnis la muziko "La Kora Kanto", kiun kantis la aŭtoroj Vicente Caetano, el Gojanjo(GO) kaj Adail Ubirajara Sobral, el Salvador.

La festivalon organizis nia juna vicprezidanto André Luiz de Souza, jam konata pianisto en Brazilo, kaj aŭtoro de kelkaj belaj muzikoj, kiujn li komponis, kantis kaj pianludis. Li estas unu el la plej aktivaj membroj de nia BEJO.

La junularo tutsola ne povas solvi ĉiujn siajn problemojn, sed la plenkreskuloj povas helpi ilin. Kiu deziras esti patrono de la junularo kaj tiel helpi ilin, turnu sin al Neia Lúcia Souza — Cx. Postal N^o 11-1110 — CEP 70.000 — Brazilja (FD). Jen la vortoj de

LA KORA KANTO

Paco regu sur la tero
kaj feliĉo super ni,
kaj la lingvo de l'espero
vivu, floru pli kaj pli!

Vivu la stelo, la stelo,
la rido rozkolora, kolora,
la ano, la ano de tiu kanto,
nia kanto, nia kanto, nia kanto tutkoral!

Inter ĉiuj belaj astroj,
kiuj brilas sur ĉiel'
unu estas la brilega,
la plej glora verda stel'!

☆☆☆☆☆☆

HELPANTOJ KAJ HELPOJ

Inter nia anaro troviĝas multaj personoj al kiuj ne eblas helpi la movadon pere de sia laboro pro ia ajn malhelpo, sed ili deziras aktive partopreni nian la-

boron por plifortigi la movadon. Pluraj el ili helpas per mono.

Nia estimata samideano Claudio Zimmermann estas unu el ili. Li rimarkas, ke nia Bulteno estas interesa, ke ni laboras senpage, do li decidis helpi nin ĉiumonate. Ni kore dankas lian helpon kaj de ĉiuj aliaj geamikoj.

☆☆☆☆☆

MACEIÓ (AL)

O "Jornal de Alagoas" de 17 de agosto último, a "Gazeta de Alagoas", de 18 e o "Jornal de Hoje", de 21, também de agosto, publicam interessantes artigos sobre a língua internacional. Eles informam: "a partir do próximo ano, provavelmente, o Esperanto estará sendo incluído no currículo do 2º grau da rede estadual de ensino". "A Comissão da Associação de Esperanto formada pelo Cel. Alves da Mata e o Dr. Ezequias Alves, nosso vice-presidente, informa sobre a abertura de um curso de Esperanto patrocinado pela Secretaria de Educação, criado com o fim de estimular as autoridades no sentido da inclusão do ensino da língua internacional Esperanto no currículo do 2º grau das escolas estaduais, possibilitando seu conhecimento pela comunidade.

☆☆☆☆☆

I-a INTERNACIA SIMPOSIO DE ESPERANTISTAJ SCIENCISTOJ

Ĉar la 1-a Latinamerika Kongreso de Esperantistoj estis elstara evento por la urbo Marilja(SP), ĝia urbestro, D-ro Theobaldo de Oliveira Lyrio decidis inviti Esperantistajn Sciencistojn okazigi Simpozion en la 4-a de Aprilo, 1979, kiam la urbo festas sian 50-jaran jubileon. Li subtenos la tre gravan aranĝon celante kunigi la homojn el la scienca medio kaj ebligi al ili trakti sciencajn aspektojn kaj problemojn en Esperanto. La simpozio okazos en la moderna salono de la Regiona Sidejo, Avenida Pedro de Toledo, 179 Marilja (SP) — CEP 17.500. — Informojn donas Prof-ro Wilson Ferreira Martins, Caixa Posta N^o 556 — Marilja(SP).

☆☆☆☆☆

SOCIETO ZAMENHOF

Ni invitas la amikojn de Esperanto partopreni la Societon Zamenhof, kreitan kun la intenco progresigi la Internacian. Movadon tra la tuta mondo.

Informoj ĉe nia redakcio.